

Ora Ĵurnalo

Numero 32, Septembro 2020



Lageto en la Botanika Ĝardeno en Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo	2	Legendoj kaj realo de la Moskva metroo	23
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Eseo pri "la influo de la angla sur la svedan"	27
Espeporko meditas.....	3	Pri la elekto de lernejo – komunuma aŭ libera/memstara.....	29
La celebros "Gotenburgo 400-jara" prokrastita ĝis 2023 pro covid-19	4	Nia lingvo kiel parto de kontinua formado..	30
Svedio nun estas la lando kun plej malmultaj personoj infektitaj de covid-19	4	Gvidlibro tra la Esperanta literaturo	31
Kunvenoj necesas – sed ekstere	5	Ligilo al legendaj libroj	32
Esti videbla – grava afero por Esperanto!	6	Nova esperanta infanlibro de Julian Modest	32
AMIKUMU! Uzu kaj helpu al Amikumu!	7	Sakraĵoj de kapitano Haddock	33
Parkoj povas esti diversaj	8	Ora Ĵurnalo ĉi medlem i Tidningsverksta'n sedan januaro 2020.....	34
"Botaniska Trädgården"	9	Fenikso – esperanto tidning från Nederländerna.....	36
Carl von Linné en la Botanika Ĝardeno	10	El la ĉeĥa magazino "informilo"	36
Hammarby, unu el la plej belaj ĝardenoj en Svedio	11	Nova versio de Mazi en Gondolando.....	37
Linnéa.....	13	Anglo rigardas Svedion	38
Haltejo: Nolby gård, ALINGSÅS	14	Ingegerd intervjuar Olof Pettersson, fd styrelseledamot i SEF	42
Parke bela tombejo	16	La Esperantisto de septembro 1889, paĝo trovita en libro de la biblioteko de Stannum	49
El eta vicseria doma "parko" en Viksjö.....	17		
Naturparko en Hisingen, Gotenburgo	19		
Sport-parko kaj preĝejo parko – por korpo kaj animo	20		
"Al Marso!" Magnus Löndén trovas la estontecan teknikon en Youtube	22		

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@telia.com. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

En nia retpaĝo – www.esperanto-gbg.org – troviĝas **listo pri libroj, kiujn oni povas prunti**. De pluraj ni havas duoblaĵojn, tiujn oni povas aĉeti. Kontakti iun el la redaktantoj se vi volas viziti la bibliotekon aŭ prunti/aĉeti libron.



Espeporko meditas



- ☆ Jam septembro! Multaj frekventas la arbarojn por kolekti fungojn kaj vakciniojn – pli multajn ol la lastan septembron. La arbaroj ne minacas per covid-19-viruso. Ni sentas nin sekuraj tie.
- ☆ Facebook havas artikolon pri la malkreskinta covid-19-infekto en Svedio. Jonas Riedel faris amuzan eseon pri imagita repago al tiuj, kiuj kondamnis la svedan strategion. Legu la komencon de ĝi!
- ☆ La temo por ĉi tiu numero estas parkoj – ankaŭ "sekuraj lokoj" se oni tenu la socian distancon. Parkoj povas aspekti diversmaniere. Ingegerd instruas nin pri la agado de Carl von Linné kaj tiuj de liaj adeptoj.
- ☆ Ekis debato pri lingvoj en la lernejoj. La Angla kaj la Internacia lernejoj logas multajn, sed ĉu vere estas bona ideo por svedoj havi instruon en la angla? Sciencistoj diras ke oni pli bone lernas per sia plej bona lingvo, plej ofte per sia gepatra lingvo.
- ☆ Retaj gazetoj kaj revuoj estas interesaj. La "Turka Stelo", la ĉeĥa "Interligilo" kaj la ĉina "Penseo" ni jam prezentis en antaŭaj numeroj de Ora Ĵurnalo, sed

"Fenikso" de Nederlando estas nova por mi.

- ☆ La civitana magazino Heroldo havas artikolon pri entrepreno, kiu celas plivastigi kaj plirapidigi multajn lingvojn, i.a. Esperanton, en la komercaĵa vivo.
- ☆ La lingvo de kapitano Haddock (en la libroj pri Tintin) enhavas amason da blasfemoj – sed ne la kutimaj. Ili vere estas kreive elpensitaj. Tamen, miaj kunuloj ne rekonas min se mi uzus ilin.
- ☆ Ĉu vi preferus iri kun Magnus al Marso aŭ iri kun Valentin en la Moskva metroo.... Supren aŭ malsupren? Provu ambaŭ!
- ☆ Troviĝas libro kun la nomo: "Hindo rigardas Svedion". Per Kerstin Rohdin ni ricevis la eblecon enmeti parton de la "galerio" de Harold Brown – "Anglo rigardas Svedion". Sed ne haltu je la fino! Daŭrigu la spektadon per klako sur lia ligilo!
- ☆ Por la Esperanto-biblioteko en Stannum ni mendis du ŝildojn – de Nordiska Skyltfabriken, Partille, por la eniro de la biblioteko, kaj de Trafikverket ĉe la vojo 190. La unua bonis, la dua fiaskis. Legu kial! – Bonan legadon! /Siv

La lasta tago por kontribuoj al Ora Ĵurnalo estas la 5a en ĉiu monato. Sendu viajn kontribuojn al la redaktantoj, vidu adresojn en paĝo 2.

La celebros "Gotenburgo 400-jara" prokrastita ĝis 2023 pro covid-19

– informo de Göteborg&Co



Foto: Carin Smederöd

Tamen oni planas formalan historian celebros la 4an de junio en 2021. Sed la granda popola festo okazos en 2023. Fakte ne estas la unuan fojon kiam gotenburga jubileo estas prokrastita. En 1921, kiam Gotenburgo estis 300-jara, oni prokrastis la celebradon du jarojn. Tio estas la kialo por celebri la 400-jaran jubileon ne en 2022, sed en 2023.

En 1923 i.a. estis malfermitaj la Artmuzeo, la Botanika ĝardeno kaj la amuzparko Liseberg.

Ĉiuj societoj – i.a. Esperanto-Societo de Gotenburgo – estas petitaj daŭrigi la planadon kaj eble realigi kelkajn agadojn jam antaŭ 2023. La celo estas evoluigi Gotenburgon, igi homojn kunlabori kaj logi turistojn kaj entreprenistojn al Gotenburgo.

Spanska sjukan – La Hispana malsano – furiozis en la komenco de la 1920a jardeko. Do, la samo ripetiĝas, nun per covid-19.


Espereble 2023 estos bonega jaro! / Siv

Svedio nun estas la lando kun plej malmultaj personoj infektitaj de covid-19 en Eŭropo ĉi tiun semajnon

Ĉu estas tempo "repagi" 😊 ? Jonas Riedel skribas en Facebook:

Do, nun Svedio estas la lando kun plej malmultaj homoj infektitaj de covid-19 en Eŭropo. Ni havas la saman linian strategion, dum aliaj landoj fermas, malfermas kaj fermas denove...

La reguloj kien svedoj rajtas iri al aliaj landoj varias de semajno al semajno.



Nun eble estas tempo "repagi". Jen la propono de Jonas Riedel por eniri Svedion:

Lunde paraj semajnoj: norvegoj, kiuj povas pruvi ke ili loĝis en Trondheim almenaŭ dum 40 jaroj, povas trapasi la limon por butikumi, se ili kondukas Volvo-aŭtojn kaj promesas aĉeti leĝere fumajitan fritkolbason.

Marde neparaj semajnoj: danoj de Ulstrup, Kungstrup kaj Vistrup rajtas iri al Norrköping por spekti vetkuradon en motorciklodromo.....

[...]

Sabate: tiam estas festo! Danoj, norvegoj kaj finnoj, kiuj havas la literon A, sed ne N en la persona nomo rajtas viziti la Malnovan Urbon en Stokholmo kaj fiŝkapti trutojn. Se ili malsukcesas fiŝkapti trutojn ili devas kvaranteni dum 14 tagoj en la urbeto Sveg.

Mi ne povis ne enmeti tiun ŝercan tekston.

/Siv

Kunvenoj necesas – sed ekstere

Ni nun troviĝas sur strato Tycho Brahegatan en Gotenburgo. La aŭtoj restas en parkejo ekster la loĝejoj. Infanoj ludas sufiĉe sekure – se ili estas singardaj en la deklivoj. De tiu loko oni havas grandan panoramon de la urbo, kaj dum sennebulaj tagoj oni eĉ vidas la lumturon de Vinga. Por la loĝantoj troviĝas kvar dometoj kun malsamaj koloroj.

Antaŭ multaj jaroj Aino Åberg (maldekstre en la bildo) startis kafejon en "sia" domo. Ĉiun mardon je la kvina posttagmeze la najbaroj ankoraŭ kolektiĝas. Nun ili devas porti la

seĝojn eksteren kaj teni la rekomenditan distancon.

Ŝajnas ke Aino konas ĉiujn en la ĉirkaŭaĵo, kaj infanojn kaj plenkreskulojn.

Ne estis mardo, kiam mi vizitis Aionon, sed tamen ni kafumis en la ombro de la domo. Mi opinias, ke gravas havi iun "Aino" en ĉiu kvartalo por forigi la anonimecon. Ĉi tie neniu forĵetas bombonpapirojn aŭ ĵetas finfumintajn cigaredojn en la florbedojn. La etoso ŝajnas tre bona – grandparte pro Aino.
/Siv



Esti videbla – grava afero por Esperanto!

Pri ŝildoj



Arne kaj Jan "plantas" ŝildon en la florbedon ekster la esperanto-biblioteko.

Nun la plantado pretiĝis.

Multaj eble diros, ke nia 20-kvadratmetra ejo ne estas vera biblioteko. Eble ne, sed ĝi estas iel



survoje paŝon post paŝo. En la hejmpaĝo – www.esperanto-gbg.org – nun troviĝas listo pri libroj, kiujn oni povas prunti.

Ĉiu biblioteko devas forpreni kelkajn librojn de tempo al tempo. Estas ĉe ni duoblaj kaj foje trioblaj ekzempleroj kun la sama titolo – nun en naŭ skatoloj. Se vi trovas listolibron, kiun vi volus, telefonu aŭ e-poŝtu al ni! Eble ĝi havas duoblaĵon.

Ĉu vi pensas ke la ŝildo estas eta? Estas tiele: pro la materialo de la domaj muroj ni ne havis permeson bori tie. Restis la florbedo.

Ni skribis al Trafikverket, petante nigroblankan ŝildon ĉe la granda vojo 190 kun la teksto: Esperanto-biblioteko. Kun tiu granda ŝildo ni nur bezonus malgrandan ĉe la domo. Bedaŭrinde la respondo de Trafikverket estis NE. Kial?

Jen la teksto de la ŝildo.



1. La domo havas numeron – Östadvägen 68, kaj vizitantoj "povas facile trovi la domon". Sur la mapo ili tamen metis Stannum nordokcidente de Gråbo anstataŭ 3 km sudoriente de la centro de Gråbo. Sed post nia atentigo ili sendis novan mapon.

2. Ni skribis ke ĉirkaŭ 300 homoj/jare vizitas la bibliotekon (troigo 😊), sed estas tro malmultaj laŭ Trafikverket.

Troviĝas multaj nigroblankaj ŝildoj al arkitekto, al pedikuro kaj al aliaj, kiuj tute ne havas tiom da vizitantoj/jare. Respondo: – Do, tiuj ŝildoj estas falcaj. Bedaŭrinde ili aspektas same al la niaj. Ŝildo ja signifas reklamo.

Por esperantistoj granda ŝildo certe ne estas bezonata. Sed ne-esperantistoj kompreneble demandus al si: kio estas tio – esperanto-biblioteko en la iama ICA-vendejo? Eble ili telefonus, petante gvidadon. Kiam mi venis por alporti la etan ŝildon ĉe Nordiska Skyltfabriken, unu el la dungitoj petis informon kaj eble partoprenos en la urba esperanto-promeno la 19an de septembro.

Kiam la loka gazeto ne havas sufiĉe da materialo eble ĵurnalisto turnos sin al ni. Jam estis ja artikolo, kiam la biblioteko estis nova, kaj unu el la komunumaj konsilistoj ja inaŭguris ĝin. / Siv

AMIKUMU!

Uzu kaj helpu al Amikumu!



Berto Šuman

Amikumu estas plursistema aplikaĵo por saĝtelefonoj (Android kaj iOS) per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn aŭ parolantojn de aliaj lingvoj. La aplikaĵo funkcias dumaniere. Oni povas trovi proksimajn esperantistojn per listo aŭ per mapo. La aplikaĵo lanĉiĝis por esperantistoj je la 22-a de aprilo 2017 (fonto: eo.wikipedia.org/Amikumu). Ĝin kreis kaj funkciigas esperantistoj. Bonvolu legi ilian peton (krion) je helpo:

Kara amiko,

La estonteco de Amikumu dependas de vi kaj la komunumo. Ni kalkulis, ke se ni ekhavas 500 novajn orajn membrojn ĉi-monate, ni povas daŭre funkciigi Amikumu kaj ni jam estas 10% tien! Ĉu ni povas dependi de vi por helpi al ni atingi nian celon kaj daŭrigi Amikumu longe en la estontecon? Tiel vi ĉiam povos trovi proksimajn esperantistojn ie ajn en la mondo!

<https://app.amikumu.com/orighu>

Por montri, ke ni seriozas pri la komunumo, ni nun reprogramas la tutan apon kaj malfermkodigos ĝin! Ĉi tiel la komunumo povas pli engaĝiĝi kaj kunfari la apon, tiel ĝia potencialo estos senlima. Ni ankaŭ aŭdis la zorgojn de la komunumo pri nia mesaĝilo, do ni decidis tute reprogrami tion de nulo por doni pli agrablan sperton.

Dankon, ke vi estas parto de nia komunumo kaj espereble ni povos renkontiĝi iutage por

esperantumi kune! ☺ Por faciligi tion, dum limigita tempo, ni ofertas rabaton de 10%, do oriĝu nun ĉe

<https://app.amikumu.com/orighu>

Amikume via,

Chuck Smith

Teknikestro de Amikumu

<info@amikumu.com>

Parkoj povas esti diversaj

(el Vikipedio)



Barokparko ĉe la palaco Versailles.



La angla parko ĉe la palaco Drottningholm, Svedio.



Central Park en New York.



La historia palacparko Pszczyna en Ŝlezio, Pollando.

Naciaj parkoj estas gardataj de la ŝtato. La celo estas protekti la naturon aŭ kulturon de

eksploatado kaj pligrandigi ĉe ĉiuj la konon kaj la intereson pri naturo-kulturoj.



Jen la nacia parko de Sarek, Svedio.

”Botaniska Trädgården”

– la granda, nekredeble bela pulmo en Gotenburgo



Jam antaŭ ol vi komencas la ensorĉan promenon en la parko vi devas scii iomete pri la historio. La adreso estas ”Carl Skottbergs

gata 22 A” en la okcidenta Gotenburgo. Carl Skottsberg estis la botanikisto kiu havis la komision krei la botanikan ĝardenon en

Gotenburgo. Oni inaŭguris la parkon la 8:an de julio dum la granda ekspozicio 1923 kiam multaj aliaj specifaj Gotenburgaj trezoroj formiĝis, ekz. "Liseberg".

La botanika ĝardeno havas proksimume 16 000 vegetaĵojn kiuj kreskas sur bedoj kaj 4 000 (i.a 1 500 orkideoj) kiuj vivas en la granda plantdomo de la parko.

Ne forgesu iri al la legomĝardeno, herbĝardeno, la ejo por la oldaj rozoj kaj la perenoj.



Post tre bezonata paŭzo kun kafo kaj ripozo iru pluen al la Rododendrovalo kaj la Roka ĝardeno kiu montras dramecan topologion.

Japana valo kun la fama naztuka arbo kiu floradas en majo.

Bonvolu, sidu sur benko kaj ripozu! Longaj promenoj postulas gravajn meditadojn!

Ĝuu kaj revenu!

/Ingegerd



Carl von Linné en la Botanika Ĝardeno

Iam la fama Carl von Linné vizitis "Botaniska Trädgården" en Gotenburgo. Tiam estis ebleco interparoli kun li. Tiu vizito okazis dum la flora tempo de la "naztuka arbo" je la fino de majo. La lernanto Carl Peter Thunberg trovis la arbon en Japanio en la jaro 1775 kaj li neniam forgesis la belan arbon. Li restis nur unu jaron en Japanio sed sukcesis skribi pri la japana flaŭro. La libro nomiĝas "Flora Japonica".





La naztuka arbo,
"Davidia
Involucrata".

Linné trovis
bananojn ĉe la
amiko George
Clifford.



La amiko kultivis bananojn sur la bieno "Hartcamp" en
norda Nederlando. /Ingegerd

Hammarby,

unu el la plej belaj ĝardenoj en Svedio

La bieno Hammarby, en la paroĥo Danmark, situas ekster Upsalo en Uplando. En letero de la 22:an de decembro en 1758 Carl von Linné rakontis pri la aĉeto de bienoj, nome Hammarby kaj Sävja. "Hammarby" hodiaŭ estas fama kaj bela muzeo kiu valoras viziti.

Carl von Linné naskiĝis en la jaro 1707 dum la printempa beleco en la subparoĥestra domo en "Råshult" Smolando. Carl von Linné naskiĝis kiam la kukolo ekkriis je someraj tagoj.

Carl von Linné priskribis sin mem tiele:

"ne estas granda, ne malgranda, malgrasa kaj rapidmova, faras ĉion tuj, ne toleras homojn kiuj alvenas malfrue, tuj kortuŝita kaj sentimenta. Ĉiam laboranta, ne kapablas ŝpari sin mem".

En la jaro 1735 Linné eldonis la grandan verkon "Systema naturæ".

Estis granda verko kiu neniam estis preta. Linné laboris antaŭ sia morto pri sia verko kaj la granda naturo.

Dum sia juna vivo li faris vojaĝojn en Svedio.

1732 al Laplando
1734 al Dalekarlio



1741 al Oelando
1746 al Vestrogotio

La vojaĝoj estis penigaj kaj postulis multe de la vojaĝanto kaj multe okazis laŭ liaj taglibroj. Kelkaj ekzemploj –

Speciale dum la Laplanda aventuro. Li preskaŭ falis kiam li supreniris la monton "Skuleberget" la 20:an de majo 1732. Li skribis pri la okazo en la taglibro de Laplando.



En Oelando li renkontis kolerajn bienistojn kiuj pensis ke Linné kaj liaj amikoj estas spionoj.

La 7-an de junio en 1741 en Skanio, li preskaŭ perdis la tutan vojaĝmonon.

Linné volis prui ke la divenvergo estas superstiĉo.

Ĉio estas legebla en la vojaĝlibro de Linné.

Iom post iom Carl von Linné fariĝis fama kaj populara instruisto. Multe da lernantoj grupiĝis ĉirkaŭ Linné kaj estis membroj de ekskursoj en la provincoj ĉirkaŭ Upsalo. El tiuj grupoj kristaliĝis specialaj lernantoj kiuj vojaĝis eksterlanden sub la komisiono de Linné. La komisiono estis pli grava ol la vivo. Pro tio la sortoj de la Linnéaj lernantoj estas tiel malĝojaj.

Jen liaj lernantoj:

Carl Fredrik Adler, 41-jara, mortis sur la marbordo de Javo.

Johan Peter Falck, 41-jara mortis en Ruslando pro sinmortigo.

Peter Forsskål, 31-jara, mortis en Jerim en Jemen pro malario.

Fredrik Hasselquist, 29-jara, mortis en Smyrna Malgrandazio pro tuberkulozo.

Pehr Löfling, 27-jara, mortis en misiejo en Venezuelo pro malario.

Olof Thorén, 35-jara, mortis pro sekvaĵoj de hinda vojaĝo.

Christoffer Tärnström, 42-jara, mortis pro febro kiam li estis sur la insulo Pulo en Candor ĉe la marbordo de Hindĉinio.

Andreas Berlin, 27-jara, mortis en Guineo pro stomaka malsano.

Alia lernanto ankaŭ havis malĝojan vojaĝon de Surinamo. Lia nomo estas Daniel Rolander kaj kiam li alvenis al Svedio li estis difektita de alkoholo kaj ankaŭ suferis de grava angoro. Li estas apenaŭ vivanta sed ne morta.

Sed ekzistis pli sukcesaj lernantoj:

Pehr Kalm, profesoro en la urbo Åbo.

Mårten Kähler, admiralitata doktoro en Karlskrona.



Anton Rolandsson Martin, malriĉa guvernisto kaj naturhistoriisto en Finnlando.

Pehr Osbeck, pastro en "Haslöv" en Halando.

Göran Rothman, doktoro en Stokholmo.

Daniel Solander, naturhistoriisto, kolektisto kaj muzeisto en Londono.

Anders Sparrman, naturhistoriisto, profesoro kaj doktoro por malriĉaj homoj en Stokholmo.

Karl Peter Thunberg, profesoro Linnéanus en Upsalo.

Carl von Linné mem mortis la 10:an de januaro en 1778. La tempo antaŭ la morto li estis malsana. Li perdis siajn memorojn. Li ne memoris la naturan laboron kiun la tuta mondo admiris. Li ne rekonis la nomojn de floroj kiuj floris. Li perdis la nomojn kiujn li mem donis al la naturo.

La tagoj de Carl von Linné finiĝis je simileco kun la floro "Lineo" kiu vivas kun neniuj pensoj, neniuj zorgoj pri io.

Sed la lineoj floras en Smolando.

Ne hezitu viziti "Hammarby" en Danmark en Uplando. Carl von Linné troviĝas tie... /Ingegerd



Linnéa

Linnéa borealis


La floro Linnéa (lineo) estas la provinca floro de Smolando. Linnéa estis ankaŭ la favorata floro de Carl von Linné. Ofte kiam Linné permesis portreti sin, li havis la floron Linnéa en la mano.

Ni vidas ankaŭ la floron sur la blazonŝildo en "Riddarhuset" en Stokholmo.

La floro estas 8–16 centimetra kaj la koloroj estas blanka kaj rozkolora.

La tempo de florado estis majo – junio. Linnéa troviĝas preskaŭ en la tuta Svedio, sed ne en la plej suda parto.

/Ingegerd



Haltejo: Nolby gård, ALINGSÅS



Kio estas "hemester"? Estas nova sveda vorto por "pasigi libertempon en la hejma regiono".

Hemma = hejme; semester = libertempo.

Pro la Kronvira pandemio, personoj kiuj en normalaj tempoj vojaĝus eksterlanden nun turistis en la ĉirkaŭaĵo. Oni ankaŭ aĉetas aĵojn, kiuj estas faritaj el lokaj produktoj, ekz. lano. Ĉe la periferio de la urbo Alingsås 60 km for de Gotenburgo situas interesa bieno: **Nolby Gård**.



Iam Nolby estis haltejo por la trajnoj, sed nun la reloj estas for kaj restas nur unu relbuso. Somere okazas foiroj en budoj malantaŭ la relbuso.

Hodiaŭ oni povas lunci ĉi tie kaj aĉeti panojn kaj kukojn.

Mi rekomendas la karot-supon kun multe da spicoj kaj semoj.

La t.n. "Slit och släng-epoken" – la "Uzu kaj forĵetu-epoko" estas for. Nun ni denove volas ripari fenestrojn, kuirejojn, meblojn, biciklojn, ŝuojn k.t.p.

Kaj – oni nun alte taksas manlaboron.

Du luantaj firmaoj troviĝas en Nolby gård: "Ekobageri & Kafé/Ekologia bakejo kaj kafejo" kaj "Ullabutta – kudrado kaj dezajno". La vera nomo de la posedanto estas Maria Söderberg. Vico de belaj roboj pendas sur vestarkoj. Ŝi zorgeme serĉas naturajn ekologiajn materialojn. Oni povas de ŝi mendi vestojn laŭ gusto.



Ĉi tiun tagon regis tipa somera vetero – suno kaj pluvo alternis. Jan, Ritva kaj mi sidis sub tilio manĝante bongustajn supojn – sen malsekiĝi. Kaj subite ne plu falis grandaj gutoj.

Iam ĉiu bieno kultivis lupolon por produkti bieron. La palisoj estis tre longaj. Tiu stango ankoraŭ ne havas konusojn, Jan diris.



Ludiloj kaj skulptaĵoj troviĝas ĉie en la bieno.

Jen birdo, gardante la bienon.....Jen hundo en barelo, ankaŭ gardante.



En la granda ruĝa konstruado troviĝas malnovaj medioj, ekz. malnova butiko.



Malnovaj ĉaroj, bicikloj, fornoj, bankuvoj, stovoj k.t.p. ankaŭ estas montrataj. Se oni ekz. bezonas falĉilon aŭ rastilon – oni trovas ilin malantaŭ la ruĝa konstruado. Antaŭ 20 jaroj oni certe forĵetis multe da uzeblaj objektoj – sed nun oni reuzas ilin, riparas, renovigas – por savi la medion.

Vi mem povas trovi vian "Nolby Gård" en via regiono – ĉu ne?

Multaj firmaoj havas malfacilaĵojn dum la pandemio, sed Nolby male profitas de la emo de homoj esplori siajn ĉirkaŭaĵojn, manĝi pladojn faritajn de lokaj produktoj, ĝui la dezajnon de "Ullabutta", frandi la kukojn el la bakejo, studi kiel renovigi fenestron aŭ nur ripozi en la parko. /Siv



Parke bela tombejo

Ankaŭ tombejoj povas esti belaj kiel parkoj. Jena tombejo *Fladstrands kirkegaard* troviĝas en Fredrikshavn, Danujo. Fotita en 5 junio 2005. /Andreas



El eta vicseria doma "parko" en Viksjö

Dankon pro la bildoj, Rakel! /Siv



Maldekstre – bildo pri ĝardeno en Viksjö (proksime al Stokholmo) kun **folibetoj** kaj eruko. La folioj de eruko similas al tiuj de leontodo kaj gustas iomete amare.

Malgraŭ ke en la ĝardeno ankaŭ troviĝas granda trampolinludilo por la 8-jara filo, Rakel sukcesis trovi lokon por kultivado de diversaj vegetaraĵoj.

Suĉinoj povas esti flavaj aŭ verdaj. Estas speco de kukumo.



Krispan brasikon oni povas rikolti eĉ se vintras.



Spicoj plibonigas ĉiun pladon!





La grandeco de tomatoj varias.



Spicoj kaj pizoj – kaj mi aldonis karotojn.



Florbedo kun strutaj ovoj...ne ne ovoj, sed ŝtonoj.

La sveda vorto **rabatt** povas signifi

- a) florbedo
- b) rabato (ekz: ricevi 10-procentan rabaton)

La terpomoj estas rikoltitaj kaj formanĝitaj.
Nun estas la vico por rafaĵoj!



Naturparko en Hisingen, Gotenburgo

Jan Hellström skribis:

Hej!

Nu när jag blickar tillbaka på den gångna delen av fågelåret i mina hemmamarker på norra Hisingen, så tar jag med två individer som fötts i år och som jag stött på under mina strövtåg.

Under ett par veckor i maj passerade jag flera gånger ett träd med kattugglehäckning. Den 5/5 syntes en vuxen kattuggla i bohålet, sedan efter hand upp till 3 ungar.

La 15/5 hade denna unge tagit sig ur boet och satt i solskenet på marken.

Den 3/8 kom jag gående längre bort i området och hörde något skrika.

Det visade sig vara en ung sparvhök, ja inte bara en utan två.

Dagen efter tog jag med mig kameran dit, och de var fortfarande kvar på platsen.

Hälsningar från naturen.

/Jan

Saluton!

Kiam mi rigardas malantaŭen al la pasinta parto de la birda jaro en mia hejmgregiono en norda Hisingen, mi kunprenas du individuojn, naskitajn ĉi tiun jaron, kiujn mi renkontis dum miaj vagadoj.

Dum du semajnoj en majo, mi kelkfoje preterpasis arbon kun arbarstriga kovado. En 5/5 estis videbla plenkreska arbarstrigo en la nestotruo, poste iom post iom estis tri idoj.

En 15/5 unu el la idoj jam eliris el la nesto kaj sidis en la sunbrilo sur la tero.

En 3/8 mi estis vaganta pli fore en la tereno kaj ekaŭdis ion krintan. Montriĝis ke estas juna nizo, jes, ne nur unu sed du.

La sekvan tagon mi kunprenis mian fotilon tien, kaj ili daŭre restis en la loko.

Saluton de la naturo!

/Jan



Sport-parko kaj preĝeja parko – por korpo kaj animo

Alia tipo de parko estas sport-parko. Tro multaj homoj moviĝas tro malmulte. Tial ekz. la komunumo de Lerum konstruis sport-parkon por ĉiuj – ekde la infanoj en la apuda lernejo – ĝis pensiuloj en la ĉirkaŭaĵo.

Por korbopilkado.



Por hokeo.



Por kurado.



Insuloj en rivero.



Se oni koleras, oni povas bati la kaŭĉukan nigran batsakon.



Se oni emas desegnaĉi sur muroj, oni prefere desegnu sur tabulo!



Ĉie estas instrukcioj kiel uzi la diversajn ekcercilojn.



En la prokcimeco troviĝas la tombejo.

Multaj similaj iloj troviĝas.



Memorloko.



Tomboj fore en granda gazono.



Malnovaj tomboj havas grandajn ŝtonojn. La plej novaj ofte havas nur etan kuŝantan ŝtonon. Ĉi tiu estas mezgranda.



”Al Marso!” Magnus Löndén trovas la estontecan teknikon en Youtube

”TILL MARS!” Magnus Löndén hittar framtidens teknik på Youtube

Starship SN5



Amerikana entreprenisto kun vizioj kaj mono kreis en la jaro 2002 la privatan entreprenon SpaceX, por i.a. koloniadi marson.

Elon Musk posedas valorojn de 60 miliardoj da dolaroj, li estas 50-jara kaj la 11a plej riĉa de la mondo laŭ Forbes.

Li devenas de Sudafriko kaj en sia juneco li vivis dum periodo en Kanado kaj studis dum kelkaj jaroj en la Queens University en Kingston.

Elon translokiĝis en Usonon por kiel entreprenisto plenumi siajn celojn.

Tiuj celoj do ankaŭ fariĝis la celoj de la entreprenoj, kiujn li startis.

’Musk has said the goals of SpaceX, Tesla and SolarCity revolve around his vision to “change the world and help humanity”. His goals include reducing global warming through sustainable energy production and consumption and lessening the risk of human extinction by establishing a human colony on Mars.’

Elon kreis la sekvajn entreprenojn kaj projektojn:

SpaceX, kiu konkuras kun ULA (United Launch Alliance kun Boeing) pri kontrakto por konstrui rakedojn por spaco-projektoj.

En Amerikansk entreprenor med visioner och pengar har, år 2002, skapat privata företaget SpaceX, för att bl.a. kolonisera Mars.

Elon Musk äger värden för 60 miljarder dollar, är 50 år gammal och den 11te rikaste i världen enligt Forbes.

Han kommer ifrån Sydafrika och i sin ungdom levde han en period i Canada och läste några år på Queens University i Kingston.

Elon flyttade till USA för att som entreprenör fullfölja sina mål.

Dessa hans mål blev då också målen för de företag han startade.

’Musk has said the goals of SpaceX, Tesla, and SolarCity revolve around his vision to “change the world and help humanity”. His goals include reducing global warming through sustainable energy production and consumption and lessening the risk of human extinction by establishing a human colony on Mars.’

Elon har skapat följande företag och projekt:

SpaceX – som konkurrerar med ULA (United Launch Alliance med Boeing) om kontrakt för att bygga raketer för rymdprojekt.

Tesla – mondkonata aŭtoentrepreno.

Li estas la prezidanto de Solarcity por instalado de sunpaneloj en loĝejoj. La entrepreno fondiĝis en 2006.

La Boeing Company – Hyperloop – kiu transportas homojn je la rapideco de la sono en moduloj tra longa tubo. Ekz. inter urboj.

Starlink–satelite system kun miloj da satelitoj en LEO (Low Earth Orbit) kiu ebligas ke ĉiuj en la mondo disponu Interreton. Tiuj satelitoj estas elŝovigitaj po 60 per Falcon 9-raketo (kiu estas evoluigita de SpaceX kaj povas esti reuzata).

Entute 12 000 satelitoj estos elŝovigitaj.

Starship – projekto ene de SpaceX, kiu prenas lokon en Boca Chica Florida, kun celo krei spacŝipojn, kiu povas esti reuzataj. La planoj estas ke pluraj el tiuj estos uzataj por kolonii Marson per 100 000 homoj.

Interese estas ke dank’ al privataj aktoroj en Boca Chica, kiuj filmas kaj enmetas tiujn eltondaĵojn en YouTube, oni povas observi multon el la evoluo de Starship Interrete, kaj sukcesajn testojn kaj malsukcesajn.

Eniru YouTube kaj serĉu ekzemple ‘wai Starship’.

Nun SN6, la sesa versio de Starship, estas testata kaj ĝi sukcese faras 150-metran salton, en testoj, kiun oni rigardas simultane.

Pli frue ĉio okazis en baritaj areoj, ekz. en komandodistriktoj.

Mil homoj laboras pri tio. Kaj rapidegas!

Akompanu min al Marso per YouTube!

/ Magnus

Tesla – vorldskänt bilföretag.

Han är ordförande i Solarcity – för installation av solpaneler i bostäder. Företaget grundades år 2006.

The Boeing Company – Hyperloop – som transporterar människor i ljudets hastighet i moduler genom en lång tube. Tex mellan städer.

Starlink–satelite system med tusentals satelliter i LEO (Low Earth Orbit) som möjliggör att alla på jorden skall ha tillgång till Internet. Dessa satelliter skjuts upp, 60 åt gången, med en Falcon 9-raket (som är utvecklat av SpaceX och kan återanvändas).

Totalt skall 12 000 satelliter upp.

Starship – ett projekt inom SpaceX som pågår i Boca Chica Florida, med mål att skapa rymdskepp som kan återanvändas. Planerna är att fler av dessa skall användas till att kolonisera Mars med 100 000 människor.

Det intressanta är att tack vara privata aktörer i Boca Chica, som filmar och lägger ut dessa klipp på YouTube kan man följa mycket av utvecklingen av Starship på Internet, både lyckade tester och misslyckade.

Gå in på YouTube och sök på tex 'wai Starship'.

Nu testas SN6, sjätte versionen av Starship, att den klarar ett 150m hopp, tester som man följer live.

Tidigare har allt detta skett på avskärmade områden, typ militärbaser. Tusen man jobbar med detta. Och det går undan.

Följ med till Mars på YouTube!

/ Magnus

Legendoj kaj realo de la Moskva metroo

Ralf Jalming skribis en numero 29 de Ora Ĵurnalo pri sia unua vojaĝo al Moskvo komence de la 1970a jardeko. Lia iama leteramiko, Valentin en Moskvo, trovis la artikolon kaj kontaktis nin por havi la adreson de Ralf. Nun ili denove havas kontakton.

Valentin interesiĝas pri la metroo en Mosko kaj sendis al Ralf artikolon pri "Legendoj kaj realo de la Moskva metroo". Ĝi troviĝis en la magazino "La ondo de esperanto" eldonita en la komenco de 2020.

Bv. legi kaj gui:

Tribuno



La Moskva metropoliteno, lanĉita en majo 1935, estas la plej granda en Eŭropo, laŭ la intenso de la uzado. En ĝia pli ol 400-kilometra reto estas 233 stacioj, inter kiuj 48 havas la statuson “kultura heredaĵo”. Dum la 85-jara historio la Moskva metroo ekhavis legendojn kaj mitojn; pri kelkaj el ili rakontas nia redakciano Valentin Melnikov.

Legendoj kaj realo de la Moskva metroo

de Valentin Melnikov

Kiel ĉiu populara kaj longe ekzistanta (ekde 1935) sistemo, la Moskva metropoliteno havas multajn interesajn, kaj iom post iom ĉirkaŭ ĝi formiĝis diversaj legendoj, ankaŭ superstiĉoj.

Oni asertas, ke la ringa linio – kiu dekomence ne estis en la perspektivaj planoj de 1930aj jaroj – konstruita en 1949-54 kaj sur ĉiuj skemoj montrata kiel bruna rondo, aperis kvazaŭ pro tio, ke Stalin, dum iu diskuto kun la urbestro pri la perspektivoj de la metroo, metis sur la mapon tason kun kafo. De la taso restis runda bruna spuro, kaj poste timemaj-servemaj-humiliĝemaj projektantoj rapide planis la ringan linion.



Reale, tio ne povis okazi. Stalin ne okupiĝis pri urbaj aferoj – nur pri la ŝtataj; kaj se tia diskuto okazus, oni uzus detalan mapon, kun 1-2-metra dimensio. Lasi samskalan spuron sur ĝi povus nur sitelego... kaj perfekte runde tiu linio aspektas nur sur simplaj skemoj, en la realo kaj sur detalaj mapoj ĝia formo estas komplika.

Cirkulas onidiroj, ke en la metroo estas ia mutaciiga radiado, kaj pro ĝi aperis grandegaj trimetraj ratoj, vagantaj en tuneloj, kaj aliaj monstroj, kiuj eĉ lumas per si mem.

Reale, en 1990aj jaroj, precipe inter novriĉuloj, estis modo havi hundojn "pitbull" – ekstere similajn al proporcie pligrandigita rato. Unu tia hundo foje forkuris, dum kelka tempo vagadis en tuneloj. En tre malforta lumo, de malproksime ĝi vere similis gigantan raton. Kiel kutime, por evoluo de klaĉoj, duonmetra rato transformiĝis en dumetran, poste en trimetran. La hundo estis sola, ĝi delonge mortis, sed la idiotaj onidiroj cirkulas ĝis nun. Cetere, nenia radiado estas en la metroo – kaj eĉ se ĝi ekzistus, bestoj pro ĝi simple mortus, sed ne lumus. Trankviliĝu...

En la stacio "Ploŝĉadj Revolucii" (Placo de Revolucio – cetere, la placo estas nomita laŭ la burĝa revolucio en februaro 1917, ne laŭ la proleta en la samjara oktobro) situas kvardeko da bronzaĵaj skulptaĵoj, prezentantaj sovietiajn laboristojn, kampulojn, armeanojn, infanojn ktp. Inter ili estas limgardisto kun hundo. Bedaŭrinde, dum lastaj jaroj modiĝis la superstiĉo: froti nazon de la bronza hundo por ricevi bonŝancon. Luj ĵurnalistaĉoj eĉ ĝoje rakontas pri tiu "tradicio", fakte propagandas ĝin. Pigraj studentoj, anstataŭ diligente lerni por ekzamenoj, turmentas la bronzan hundon. La skulptaĵo jam estas en plorinda stato, videble detruigita – sed la vandalismo bedaŭrinde daŭras senpune.

Ni revenu al la realo. En ĉiuj moskvaj metrotrajnoj la voĉaj anoncoj pri la aktuala kaj sekva stacio, pri transirejoj, avertoj pri fermiĝo de pordoj – sonas per vira voĉo, kiam la trajno iras direkte al la centro, kaj per virina voĉo, kiam la trajno iras for de la centro. Sur la ringa linio vira voĉo estas sur interna vojo (horloĝmontrila direkto), la virina sur la ekstera (male).

Tio estas farita por helpi al blindaj pasaĝeroj, kaj tio oportunas ne nur por ili (en aliaj urboj mi ne aŭdis tiaĵojn), por ne miksi direktojn en granda sistemo. Tamen, kiel memorfiksi? Ofte oni diras: matene via estro (viro) vokas vin al laboro (en la urbocentron), vespere via edzino vokas vin hejmen (al periferiaj loĝdistriktoj). Tamen, tio neniel klarigas la ringan linion. Memorfiksi la tuton tre facilas per alia metodo. (Bigotoj, forturnu vin de la ekrano!) Imagu la naturan fiziologian procezon inter viro kaj virino. Li strebas internen, kaj ŝi faras rean movon. Nu, aŭ imagu alian procezon kiu povas okazi naŭ monatojn post la unua. Same pri la ringo, la viro estas ene, la virino ekstere...

La Moskva metroo estas ne nur efika transportilo, sed ankaŭ grandega muzeo. Malrapidigu viajn paŝojn, rigardu ĉirkaŭen, levu la kapon! Mozaikoj, freskoj, skulptaĵoj, bareliefoj ornamas malnovajn kaj novajn staciojn. Laŭ ili eblas studi historion. Sur la plafono de "Majakovskaja" estas serio de mozaikoj laŭ skizoj de la fama sovetia pentristo Aleksandr Dejneka – "Diurno de la Sovetia ĉielo". Same laŭ liaj

Metrostacio "La placo de Revolucio".



skizoj estas faritaj mozaikoj en "Novokuzneckaja" (sep en la stacio mem kaj unu en la surtera vestiblo). La mozaikisto Vladimir Frolov laboris en la sieĝata Leningrado en 1941-42 en teruraj kondiĉoj, tamen li finfaris ĉion kaj baldaŭ mortis pro malsato. La mozaikoj dekomence estis destinitaj por alia stacio – "Paveleckaja", sed tiam (1943) oni ne sukcesis konstrui ĝin laŭ la projekto, ĉar bezonataj grandaj detaloj troviĝis sur teritorio okupita de faŝistoj. Tial la mozaikoj aperis en la apuda "Novokuzneckaja", kaj "Paveleckaja" ricevis la projektitan aspekton (sed kun alia arta aranĝo) post funda rekonstruo nur en 1959.

En la surtera vestiblo de "Dobrininskaja" (1950) oni vidas mozaikon, kiu prezentas festan manifestacion. Homoj estas vestitaj laŭ la modo de la tujpostmilitaj jaroj, tamen ili portas portreton de la unua kosmonaŭto Jurij Gagarin, fluginta la 12an de aprilo 1961. Kial? Rigardu la mozaikon deflanke – vi rimarkos, ke ĉi tiu portreto havas surfacon tute malsimilan al la cetero. Pli frue ĉi tie estis portreto de Stalin, forigita post la "kondamno de la personkulto".

Marmoro de kelkaj stacioj enhavas bone videblajn restaĵojn de gigantaj konkoj, formitaj antaŭ dekmilionoj da jaroj. La stacio "Rimskaja", aranĝita en antikva stilo, havas veran fontanon subtere. "Miĉurinskij prospekt" havas vitran muron, tra kiu videblas apuda parko. "Vorobjovi Gori", la plej longa, situas sur ponto super la rivero Moskvo kun belegaj panoramoj. Kaj multo, multo alia. Venu en Moskvon kaj dediĉu tutan tagon (eĉ tiom ne sufiĉos!) por rigardi nian metroon. Por prepariĝi, anticipu legu la romanon *Metropoliteno* de Vladimir Varankin.



En la stacio Dobrininskaja Gagarin anstataŭis Stalinon.

Eseo pri "la influo de la angla sur la svedan"

Arne Rubensson de Språkförsvaret (La defendo de la gepatra lingvo) <http://www.sprakforsvaret.se> enmetis debatartikolon pri "la influo de la angla en la svedan" en germanan esplorseon – "Englisch in europäischen Sprachen", eldonita de FAU University Press, sed la iniciatinto estas la organizo Verein Deutsche Sprache.

Ni ricevis la svedan version kaj de la prezidanto de Språkförsvaret Per-Åke Lindblom kaj de la verkisto mem.

Pro la longeco mi devis mallongigi ĝin. Espereble Arne ne pensas ke mi detruis lian tekston.

Eble li en alia numero povus kunlabori pli!

La angla en la sveda



Ĉio komenciĝis per erara klako sur la klavaro. Anstataŭ skribi la vorton Engelskan li skribis Englskam en la rubriko. La unua signifas "la angla", la dua "la angla honto". Interese, li pensis. – Ĉu ne estas tiel ke la svedoj hontas pro sia "eta lingvo"?

La statuso de la angla verŝajne estas pli alta ol tiu de la sveda. Kial ekz. vendejoj havas ŝildojn kun la vorto "sale" anstataŭ la malnova vorto REA? Por franco la vorto "sale" signifas "malpura". Bedaŭrinde fremdaj lingvoj, krom la angla, malofte estas studobjektoj por la nunaj svedaj gelernantoj.

Arne atentigas pri oftaj penseraroj:

- 1) la sveda ne estas eta lingvo. Inter 5 000–7 000 lingvoj en la mondo, la sveda troviĝas inter la 100 plej parolataj. Esperanto ankaŭ troviĝas inter la 100 plej parolataj.
- 2) La angla ne estas la plej parolata lingvo en Eŭropo. Ĝi nur troviĝas en la kvara loko, post la rusa, la germana kaj la franca. Do, la kvara en vico, ne la unua! Se kelkaj anglaj vortoj envadas la svedan ne estas tro minace por

nia lingvo. Estas kiel fiherboj en florherbejo. Sed kiam oni uzas la anglan por informi svedojn pri novaĵoj en la entrepreno – estas pli danĝere.

Nu, povus esti fremdlingvaj ĉefoj kaj kunlaborantoj, kiuj ne regas la svedan. Sed ankaŭ ekster la laborejo oni pli kaj pli uzas anglajn frazojn por ke la parolo havu "pli altan statuson". Oni riskas havi riĉajn, bone edukitajn homojn, kiuj parolas la anglan kaj malriĉaj personoj, kiuj parolas la svedan.

Kial oni ne fieras pri sia gepatra lingvo? Kial gepatroj emas havi siajn gefilojn en "La Anglaj Lernejoj". Tiuj lernejoj profitas de la sveda sistemo kaj ĉiun jaron havas profiton de ĉirkaŭ 150 miloj da kronoj, dank' al impostoj kaj donacoj de entreprenoj.

Arne akcentas ke la kialo ne nur estas ke la gepatroj volas doni al siaj idoj "globan lingvon". La ĉefa kialo verŝajne estas ke la anglaj lernejoj praktikas severan disciplinon kaj donas hejmtaskojn.

La lerneja reformo en 1994 kaŭzis pli malaltan scion pri fremdaj lingvoj, krom la angla. La konata "internaciado" egalas kun fokuso al la anglo-amerika mondo. Kun lingvo venas kulturo.

Koni la anglan estas pozitive, Arne diras, sed se la kono en la sveda malboniĝas oni gajnas nenion.

La scienca eldonejo "Multilingual matters" montras en studaĵo, ke lernantoj en angloparolantaj gimnazioj havos malfacilaĵojn esprimi sin en la sveda. Dum la unua studsezono oni ne vidis diferencon pri la scio de la sveda, sed dum la kvara studsezono la gelernantoj en la angleparolanta lernejo skribas multe pli malbonan svedan ol la gelernantoj en la svedparolantaj lernejoj, malgraŭ ke ili povus havi pli bonajn notojn. Lernejanoj en la sveda lernejo averaĝe regas la anglan je la sama nivelo kiel la lernantoj en la Angla lernejo.

En la angla lernejo oni donas malmulte da atento al la sveda. Tiu kiu lernas la anglan ankaŭ estas influataj de la anglo-saksa kulturo.

Troviĝas 22 lingvoj en la mondo, kiuj estas oficialaj en pli ol unu lando kaj la sveda apartenas al tiu grupo (en Svedio kaj Finnlando). Laŭdire oni opinias ke dank' al Finnlando la sveda fariĝis oficiala lingvo en EU, ĉar Svedio forgesis petskribi.

Anglaj vortoj abundas en anoncoj. En 1955 nur 5,2 % da anglaj vortoj invadis la anoncojn, en 1995 44,6 %... kaj nun??? Ekz.

Quality Manager, Projekt leader, Controller, Salesman k.t.p.

Språkförsvaret atentigas nin pri la fakto, ke se ni ne alte taksas la svedan pli kaj pli homoj pensas ke oni ne devas lerni ĝin.

Språkförsvaret eble estas la "kanario en la minejo", kiu unue sentas la venenajn gazojn. Tial Språkförsvaret multe strebas informi kaj influ!

Se vi volas legi lian tutan artikolon en la germana bv. klaki la ligilon sube.

Bonan legadon!

/Siv

https://opus4.kobv.de/opus4-fau/files/14311/Englisch_in_europaeischen_Sprachen_OPUS2.pdf

Pri la elekto de lernejo – komunuma aŭ libera/memstara

El la aŭgusta magazino Skolvärlden (La "Eduka Mondo")



Tute memstaraj/liberaj lernejoj ne ekzistas en Svedio. La instruplano estas la sama kiel en la komunumaj lernejoj. La komunumoj ja pagas kaj por siaj propraj lernejoj kaj por la liberaj lernejoj. Se iu libera lernejo ne sekvas

la intencon de la ŝtate deciditaj programoj, oni povas fermi ĝin. Okazis en Gotenburgo ĉar en "libera lernejo" oni ne instruis knabojn kaj knabinojn en la sama lokalo kaj oni ne traktis religiojn neŭtrale.

Arne Rubensson parolis pri la Angla lernejo. Eble estas praktika ebleco por eksterlanda familio, kiu ne intencas resti en Svedio, kaj tial ne bezonas regi la svedan. Tamen ankaŭ svedaj familioj ofte elektas liberan lernejon kun alta statuso, prefere la Anglan lernejon. Arne montris la malavantaĝon de tiu elekto koncerne la evoluo de la sveda.

Laŭ Skolvärlden preskaŭ 10 % el la gelernantoj, kiuj naskiĝis eksterlande frekventas liberajn lernejojn.

Jen kelkaj ciferoj: En libera lernejo en Svedio la gelernantoj estas

el Hindio 42 %, el Usono 28 %, el Britio 27 %, el Germanio 25 %, el Ĉinio 21 %, el Hispanio 17 %, el Danio 15 %, el Italio 13 %, el Rumanio 12 % kaj el Turkio, Grekio, Pollando kaj Norvegio 11 %.

El Irano, Vietnamo, Eritreo kaj Afganistano nur kelkaj % frekventas liberajn lernejojn en Svedio.

La edukiteco de la gepatroj estas la plej elstara faktoro por la elekto de liberaj lernejoj.

La libera elekto de lernejo rezultigis ke la diferenco inter lernejoj grandiĝis. Komunumaj lernejoj en antaŭurboj kun multe da enmigrintoj ofte montras malbonajn rezultojn. Okazas ke gepatroj sendas siajn gefilojn al la urbocentroj kie la plejparto de la lernejoj – komunumaj aŭ liberaj – montras pli bonajn rezultojn. Do, troviĝas A- kaj B-lernejoj.

La evoluo iras en malbonan direkton, OECD atentigis nin. La segregacio de la lernejoj pli kaj pli grandiĝas. Ankaŭ la segregacio de loĝantoj en urbopartoj kulpas.

Iam la svedaj gelernantoj estis en la pinto, sed ne plu. Bedaŭrinde!!!

Nia lingvo kiel parto de kontinua formado



Loretta Bellotti, kunfondinto kaj direktorino de "LEST Formazione", Partnero och ĉeĉfo de Nutriendo – entrepreno, en la nutraĵa sektoro.

Bertil Nilsson sendis al ni informon pri **Lorena Bellotti**, kiu ofte reprezentas Esperanton en ALTE*.

Per la ligilo

<https://www.lestgroup.com/staff/lorena-bellotti/>
oni povas trovi informon (sed en la itala) pri

"Lest Group", kiu estas lernejo, en kiu oni decidis uzi Esperanton profesie.

Lorena Bellotti evidente estas en gvida pozicio de la lernejo "Kultura Centro Esperantist", sponsoras la privatan lernejon de Lorena Bellotti, kiu sukcesis enigi esperanto-kursojn por manaĝeroj kaj firmaoj en la oficialan oferton de Regiono Lombardio por kontinua formado.

La kursoj celas trejnadon en transnacia komunikado, prepare al logika pensostrukturado kaj al la solvo de interkulturaj problemoj.

Rajtas aliĝi nur personoj, rezidantaj aŭ komerce registritaj en Lombardio. Eblas fizika aŭ virtuala partopreno: por ĉiu akceptita individuo.

La regiono financas po du mil eŭroj. La financado al la akceptitaj institutoj atingas maksimume kvindek mil gekursanojn.

La Esperanta Civito sekvas kun intereso la iniciaton, ankaŭ por reproponi ĝin al similaj katalogoj de aliaj regionoj en Eŭropa Unio.

* ALTE = Asocio de Lingvo-testistoj en Eŭropo. UEA aktive partoprenas en la laboro de la specialaj interesgrupoj (SIG) de ALTE. Valoraj libroj de Zsófia Kóródy: "Manlibro por testprikaksado kaj ekzamenado" kaj "Esperanto de nivelo al nivelo", kiu enhavas modelajn testojn laŭ KER. [HeKo 742 7-B, 27 aŭg 20] /Siv

Gvidlibro tra la Esperanta literaturo

Daŭris ĝis mi trovis la bonegan libron de Sten Johansson – Kroze–proze. Registrante librojn mi trovis ĝin. Kiom multe da libroj troviĝas, kiujn mi ankoraŭ ne legis kaj verŝajne ne havos tempon legi. Same pri la svedlingva literaturo en originalo kaj traduko. En la libro-studrondo de mia loka biblioteko mi trovis ke ĉiuj legis pli ol mi.

En libro-vendejo mi trovis etan libron kun 80 romanoj – ĉiuj kun rezumo en nur *unu* paĝo. Kompreneble mi aĉetis ĝin! Estas "80 romanoj por vi, kiu devas rapidi". Ĝi estas amuza, sed tute ne serioza. Jen paĝo pri Odiseo:

Sten Johansson skribis: "Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, beletraj tekstoj estis por li grava ilo por elprovi kaj pliriĉigi la lingvon. Novaj vortoj, novaj esprimoj, viglaj parolmanieroj, komplikaj frazaranĝoj, fakaj terminoj ktp, ofte estiĝis dum verkado aŭ traduko de literaturo.



Laŭ konata kliŝo, verkado de poemoj en Esperanto sekvas tuj post la kurso por komencantoj. [...] kaj vere plenas je poetoj pli aŭ malpli talentaj. [...] En la frua epoko la poemoj de *Zamenhof*, *Devjatnin*, *Hankel*,

Schulhof kaj multaj aliaj tre gravis, kaj por la lingva stabiliĝo, kaj por la evoluo de esperantista sento de komuneco. [...] En sekvaj jardekoj aperis poezio pli matura, ekz. socialisma poezio de *Miĥalski*, la parnasismo

de *Kolocsay*, la postparnasismo de *Auld* kaj *Boulton* aŭ la modernismo de *Ragnarsson*, *Nervi*, *Camacho* kaj aliaj. Post 1980 la originala poezio ekhavis novan, ŝatatan branĉon el kantotekstoj de muzikgrupoj kiel *Persone* kaj kantistoj kiel *Bronŝtejn*.”

Literaturo ne estas nur poezio. La unua originala prozo de beletra karaktero aperis en junio 1891. En Kroze–proze troviĝas ”Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo” (kompilita de *William Auld* en 1988 kaj ĝisdatigita de li en 1997).

Kroze–proze pritraktas literaturon de la komenco ĝis hodiaŭ el diversaj aspektoj. Mi multfoje ekz. vidis la svedan nomon *Stellan Engholm*, sed ne sciis ion pri la homo malantaŭ la verkado. Nun mi scias ion. La 158-paĝa libro estas konsulta libro sed ankaŭ ĝi enhavas la propran opinion de

Sten Johansson pri la verkistoj kaj iliaj skribmanieroj.

